„Mutig vorwärts!“ „Kuraĝe antaŭen!“

Aŭstria Esperantisto
(Österreichischer Esperantist)

Oficiala organo de Aŭstria Esperanto-Delegitaro.

3a jaro. No. 6 Monata Junio 1926

Redaktejo kaj administrejo: Korneuburg ĉe Wien, Postfach.

Konto ĉe poŝtŝparkaso aŭstria n-ro D-123.826.

Jarabono (komencigebla ĉiumonate): Por aŭstrianoj aŭ. S 4.20, germanlandanoj RM 3.—, alilandanoj sv. fr. 4.—; ponumere: por enlandanoj 40 aŭ. g., eksterl. 50 aŭ. g.

Aus aller Welt.

Esperanto und die Arbeiter.

Die Arbeitervertreterschaft bei der 8. Int. Arbeitskonferenz in Genf, einberufen vom Int. Arbeitsamt des Völkerbundes, hat über Vorschlag des irländischen Arbeiterrates Mortished am 7. Juni folgenden einstimmigen Beschluß gefaßt:

„Die Arb.-Vertr. der 8. Sitzung der int. Arb.-Konferenz, welche während der Sitzung die Schwierigkeiten kennen lernte, die von der Sprachverschiedenheit verursacht werden, und die Unmöglichkeit erkannte, diese Schwierigkeiten nicht einmal durch Anwendung von drei Nationalsprachen zu überwinden, erklärt, daß die Sprachenfrage der schnellen, vollständigen Verständigung und Zusammenarbeit der verschiedenländischen Arbeiter bedeutende Widerstände entgegensetzt.

Deshalb rät die Vertreterschaft den nation. und intern. Arbeiterorganisationen sowie auch den einzelnen Mitgliedern, sie mögen die Möglichkeit, Esperanto als neutrale intern. Hilfssprache zur Lösung des Problems zu verwenden, in Erwägung ziehen.“

Den Antrag unterstützten der Belgier Mertens, der Ungar Jaszai, der Engländer Pugh, der Afrikaner Curran und Serrarens, Sekr. des Intern. Christl. Gewerkschaftsbundes.

Ein Vorschlag für Esperanto in der Wissenschaft.

200 Studenten der Universität von Rio de Janeiro (Brasilien) haben ein Gesuch an den Gesandten Deutschlands in Brasilien gerichtet, um vorzuschlagen, daß die Hauptwerke der deutschen Heilkunde für den Gebrauch der Ausländer in Esperanto übersetzt werden möchten. Die Wissenschaft der großen deutschen Meister, sagt das Gesuch, wird uns vermittelt durch wenige Übersetzungen in französischer, italienischer und spanischer Sprache, die wir infolgedessen gezwungen sind zu erlernen. In Anbetracht der großen Schwierigkeiten der Erlernung der deutschen Sprache bleibt uns die Mehrzahl der großen wissenschaftlichen Arbeiten unbekannt. Die einzige Möglichkeit, uns die Kenntnis der großen deutschen wissenschaftlichen Arbeiten zu erleichtern, wäre die Übersetzung der hauptsächlichsten Werke in Esperanto, aus der Tatsache heraus, daß 20 Stunden Studiums dieser Sprache genügen, um alles zu lesen und zu verstehen, was in dieser wunderbaren und leichten Sprache geschrieben ist.

Esperanto und Radio.

Esperanto vervollständigt mehr und mehr seinen Radio-Wörterschatz. Das bekannte französische Radio-Jahrbuch „Annuaire de TSF“ enthält in seinem mehrsprachigen Wörterbuchteil auch eine Spalte in Esperanto. Ein Radio-Wörterbuch Englisch—Esperanto ist bereits vor einiger Zeit erschienen. Soeben ist eine Ausgabe Dänisch—Esperanto herausgekommen. Entwürfe ähnlicher Wörterbücher sind schon in Deutsch und Russisch erschienen.

Seit kurzem erscheint in dem bekannten französischen Radio-Verlag „Chiron“ in Paris ein umfangreiches, gut abgefaßtes Radio-Organ „Internacia Radio-Revuo“ vollständig in Esperanto.

Esperanto und Fremdenverkehr.

Es ist bekannt, daß Esperanto bereits in umfassender Weise im Verkehr angewendet wird. In letzter Zeit ist eine große Anzahl bebilderter Führer in Esperanto erschienen. (Schweizer Bundesbahnen, Schweizer Verkehrszentrale, Zürich, Zoppot, Genf, Wiesbaden usw.)

Man erfährt aus Berlin, daß die große Reisevertretung „Mitteleuropäisches Reisebüro“ (MER) eine besondere Esperanto-Abteilung eingerichtet hat, um Esperanto im Fremdenverkehr nutzbar zu machen. Die Abteilung befindet sich im „Potsdamer Bahnhof“. (Anschrift: MER 10, Esperanto-Abteilung, Potsdamer Bahnhof, Berlin W. 9.)

Anderseits enthält das Europäische Fahrplanbuch des Reisebüros Thos. Cook & Son eine Tafel der üblichen Sätze für den Gebrauch der Reisenden in Esperanto.

Aus „Int. Esperanto-Dienst“ — Genf. Diese Quelle ist bei Abdruck anzuführen.

„Radio-Wien (Welle 582,5)." Übungsecke zum Esperantokurs.

Geleitet von Walter Smital, staatl. geprüft. Esperanto-Lehrer.

Longa letero al mia aŭskultantaro.

(Fino.)

Mi ankoraŭ klare memoras ekskurson al la rivero ekster la urbo. Post promenado tra herbejoj kaj arbetaĵoj ni eksidis ĉe la bordo kaj la partoprenantinoj sternis grandegan tablotukon sur la herbaĵon. Baldaŭ flanke flagris hela fajro, super kiu viando estis rostata kaj akvo por teo boligata. La rusinoj regalis nin per amasego da membakitaj kukoj, per lakto, mielo, buterpano k. s(imilaĵoj). Familio ne estus povinta pli konkorde kunesidi, kvankam ni apartenis (an-is) al sep diversaj nacioj. — —

La lastaj radioj de l' adiaŭanta suno reflektiĝis el okuloj larmantaj, kiam unu post la alia kantis plej belajn siajn popolkantojn en la mildan vesperon — per unu lingvo komprenebla por ĉiuj. En la paŭzoj neniu sentis emon al babilaĉado: Edifa horo unuiĝis nin. Jen diru iu, ke Esperanto ne estas lingvo vivanta!

Neforgeseblaj restos ankaŭ por mi la multaj belaj posttagmezoj en la klubo, kie mi povis instrui 5jaran knabineton, kiu ankoraŭ ne havis ideeton pri la malfacilaĵoj de la rusaj gramatiko kaj skribo, sed jam ĉarme babilis esperantlingve.

Al tatara kamparano mi tie klarigis laŭ lia demandado la por li enigmajn vortojn „telegrafo" kaj „akvokondukilo".

Fine la horo de nia adiaŭo de rusa tero estis veninta, ni estis hejmen veturontaj.

Sur la perono antaŭ la stacidomo la klubo estis plennombre kunveninta. La prezidanto, studanto de la universitato en Vladivostok, parolis kortuŝantajn, impresajn adiaŭvortojn. Ĉirkaŭbrakado, frataj kisoj, larmoj, floroj, floroj. Kurado al la vagonoj, ekfajfo, tuksvingado.

Ili restis starantaj, la bonaj homoj, kantante la E.-himnon. La trian strofon nur ni solaj ankoraŭ zumis en la vagono. Meditante, dolore emociite mi fiksrigardis la blankan rozon en mia mano — — —

Ein langer Brief an meine Hörerschaft.

(Schluß.)

Ich erinnere (mich) noch klar (an) einen Ausflug an den Fluß außerhalb der Stadt. Nach einem Spaziergang durch Wiesen und Gebüsche nahmen wir am Ufer Platz (= begannen zu sitzen) und die Teilnehmerinnen breiteten ein Riesentischtuch auf dem Rasen aus. Bald loderte abseits ein helles Feuer, über dem Fleisch gebraten und Teewasser gekocht (= zum Sieden gebracht) wurde. Die Russinnen bewirteten uns mit einer Unmenge von selbstgebackenen Kuchen, mit Milch, Honig, Butterbrot u. ä(hnlichem). Eine Familie hätte nicht einträchtiger beisammensitzen können, obwohl wir sieben verschiedenen Nationen angehörten. — —

Die letzten Strahlen der scheidenden Sonne spiegelten sich (reflekto = Widerschein, Reflex) in tränenfeuchten (= tränenden) Augen, als (= zu der Zeit da) einer nach dem anderen seine schönsten Volkslieder in den milden Abend (hinaus)sang — in (= mittels) einer Sprache, verständlich für alle. In den Pausen spürte (= fühlte) niemand Lust (= Neigung) zum Tratschen: Eine Erbauungsstunde einte uns. Da sage (noch) einer, daß Esperanto keine lebende Sprache ist (= nicht ist eine l. Spr.)! —

Unvergeßlich werden mir auch die vielen schönen Nachmittage im Klub bleiben, wo ich ein 5 jähriges Mäderl unterrichten konnte, das noch keine Ahnung hatte von den Schwierigkeiten der russischen Sprachlehre und Schrift, aber schon herzig (= lieblich) Esperanto plauderte.

Einem tatarischen Bauer (= Landbewohner) erklärte ich dort über sein (= gemäß seinem) Fragen die für ihn rätselhaften Wörter „Telegraph" und „Wasserleitung".

Schließlich war die Stunde unseres Abschieds von russischer Erde gekommen, wir sollten heim fahren.

Auf dem Bahnsteig vor dem Bahnhof war der Klub vollzählig versammelt. Der Vorsitzende, ein Student der Universität Wladiwostok, sprach rührende, eindrucksvolle Abschiedsworte. Umarmung, Bruderküsse, Tränen, Blumen, Blumen. Laufen zu den (Eisenbahn-)Wagen, Pfiff, Tücherschwenken.

Sie blieben stehen, die guten Menschen, die E.-Hymne singend. Die dritte Strophe summten wir nur mehr allein im Wagen. Nachdenklich, schmerzlich bewegt starrte ich auf die weiße Rose in meiner Hand — — —

La jubilea festo de „National-Bibliothek“ en Wien.

Sciigoj de l' kortega konsilano kaj vicdirektoro de „National-Bibliothek“ d-ro F. Baumhackl disponigitaj al A. E.

Kiel la ekstera epigrafo sur la mezkonstruaĵo de l' parada salonego de „National-Bibliothek“ (nacia biblioteko) sur Josefsplatz montras, la pompa konstruaĵo estis finata en 1726. Ĝi do ekzistas 200 jarojn. La konstruinto, Fischer von Erlach, „la malpli juna“, ne estis ĝisvivinta ĝian finkonstruon. Li mortis 1723 kaj lia filo, Fischer von Erlach, „la pli juna“, finkonstruis ĝin. Poste dum kvar jaroj Daniel Gran pentris la freskojn, kiuj ornamas la internon. La longeco de la ejo estas proksimume 80 m, la alteco de la meza kupolo 30 m; por profana konstruaĵo grandiozaj mezuroj. La parada salonego enhavas, ĉar ĝi estis okupita unue per libroj, la plej antikvajn erojn de la nacia biblioteko je presverkoj. En la kupolejo estas la perlo inter la perloj de ĉi tiuj antikvaĵoj, la libraro de l' princo Eugen von Savoyen; ĝi ricevis de samtempulo la laŭdon, ke ĝi prezentas la plej belan kaj plej altvaloran librokolekton de l' tiama tempo. Ejo kaj enhavo harmonias unu al alia en ĉi tiu plej bela bibliotek-salonego de l' mondo.

La nacia biblioteko estas tiel nomata nur depost la reĝimŝanĝo. Ĝi nomiĝis antaŭe „Hofbibliothek“ (kortega biblioteko) kaj en la tempoj, kiam la sciencistoj ankoraŭ skribis en latina lingvo, pli longe ol ĝis la mezo de la XVIII-a jarc. „Palatina“.

Kiel tria fratino ĝi apartenas kun „Vaticana“ en Roma kaj la nacia biblioteko en Paris al la malnovaj jam en la XVI-a jc. ekzistintaj centraj bibliotekoj grandiozaj. La vasten efikanta potenco de la imperiestra dinastio ankaŭ montriĝas en la verkaro de la librokolekto. Apud altvaloraj kolektoj de la unua-perioda hispana dramverkaro troviĝas tie nederlandaj miniaturmanuskriptoj, estis kolektataj slavaĵoj, hungaraĵoj en granda kvanto. Libroj kaj bildoj pri la pompaj festoj de l' kortego, ofte riĉe ilustritaj verkoj luksaj, prezentiĝas multnombre. La kolekto de portretoj, enhavanta 100.000 pecojn, ne trovos ion egalan koncerne riĉenhavon. La muzika kolekto enhavas plej valorajn verkojn je antikvaj muziknotaĵoj, kiujn sekvas ĉiuj ĝis la plej modernaj majstroj de la muzikarto en Aŭstrio, reprezentataj per aŭtografoj. Inde prezentiĝas apud aliaj samspecaj kolektoj tiu de la „Papirusoj Rainer“. La plej juna infano estas la teatra kolekto, en kiu ĉio koncernanta teatron el la teatraj arĥivoj en Wien kuniĝis. Ĝi estas neelĉerpebla, multe vizitata fonto por teatra historio.

La nuntempa inventaro je presverkoj sumas 1,200.000. Sed Wien krom tio havas duan grandan bibliotekon, nome la universitatan, kun 1,000.000 da volumoj. Krome ekzistas 30.000 manuskriptoj.

La nacia biblioteko mem sin festis per eldono de festpresaĵo, kiu enhavas sur 870 paĝoj 43 kontribuojn de nunaj kaj iamaj membroj de l' instituto (inter ili 15 profesoroj kaj docentoj, kiuj tie estis meritintaj siajn rangojn) kaj atestas la sciencan spiriton regantan tie.

„Societo de l' amikoj de la nacia biblioteko“ donacis okaze la 200 jara jubileo belegan plaketon en majstreca maniero prezentantan perspektivon al la kupolejo de l' parada salonego.

La jubileo de la nacia biblioteko krome kaŭzis, ke „Unuiĝo de germanaj bibliotekistoj“ okazigis sian nunjaran kongreson ĉi tie je la sama tempo.

Esp.-igis Steiner.

Paneŭropa Unio.

Ni ricevas de la centro jenan sciigon:

Antaŭ kelkaj tagoj okazis en „Reichstag“-Berlin en ĉeesto de l' fondinto de P. U., grafo Coudenhove-Kalergi, kunveno de la germana sekciestraro por priparoli la propagandmanieron por sukcesa enkonduko en Germanlando.

La prezidantaro konsistas provizore el „Reichstag“-prez. Paul Loebe, deputito Koch kaj grafo Lerchenfeld kun kooptrajto je anoj de aliaj frakcioj kaj eminentuloj. Anstataŭanta estrarano: Geh. Reg.-R. prof. d-ro Jul. Wolf. En junio estos kooptataj eminentuloj el la plej diversaj agadsferoj spiritaj kaj ekonomiaj.

Esperanto en vilaĝo.

En la vilaĝo Gramat-Neusiedl finiĝis 7 monata E.-kurso kun 8 knabinoj de vilaĝanoj kaj kelkaj laboristinoj de fabriko Marienthal. Sukceso estis tre ĝojiga. Denova pruvo, ke Esperanto por ĉiuj popolklasoj estas nepre facile lernebla. Grupo fondota en aŭtuno. Nova kurso ĝenerala komencos en septembro; jam multaj anoncoj.

Hans Svehla-Gramat-Neusiedl.

18a Universala Kongreso de Esperanto

Edinburgh, 31. julio—7. aŭgusto 1926.

Edifa, impresa festo de E. L. K. A.

La 16. majo estis kunvenintaj la anoj de E. L. K. A. kaj de A. K. L. E. en la pilgrimpreĝejo Maria Grün por festi sian Encikliko-feston. Germana prediko de relig. prof. Joh. Leeb pri „La solvo de la laborista problemo per la katolika eklezio"; sankta beno de Konsistor. — R. P-ro Meŝtan, akompanata de esp.-lingvaj Mario- kaj benkantoj, E.-preĝoj. La preĝejo ne povis enhavi ĉiujn, pro kio la prediko okazis ekstere. Impreso al la publiko grandioza.

VI-a Aŭstria Esperanto-Kongreso en Graz.

Ĉi jaron ni okazigis nian aŭstrian kongreson dum pentekosto en la belega ĉefurbo de Stirio, en Graz. La protekton akceptis la landestro de Stirio d-ro Rintelen kaj la urbestro de la ĉefurbo Graz Vinzenz Muchitsch.

Policistoj kun brakrubandoj „Esperanto" atendis la gastojn antaŭ la vagonoj kaj kondukis ilin al la akceptejo, kie ŝvitis nia Mader. E.-flagegoj sur la stacia konstruaĵo kaj urbdomo publikigis E.-kongreson al la Graz-anoj.

Sabate vespere kunvenis la multaj alvenintaj gekongresanoj en „Annensäle" por interkonatiĝo.

Dimanĉe, 8-a: Diservo kun esperantlingvaj prediko (kaplano Schmidt el Gamlitz) kaj kantado (meso de Schubert, elp. Ŝubert) en katolika „Ursulinen"-preĝejo; je la 10-a: Solena malfermo en la konferenca salonego de l'urba konsilanaro en la urbdomo. Ĉeestis, anstataŭante la malhelpitan landestron, landa registara konsilano Gass; la urbestro Muchitsch; reprezentantoj de multaj publikaj estraroj kaj de la gazetaro.

LKK-prez. kolonelo Hackl salutas la kongreson kaj proponas la kongresestraron. Kongres-prez. ekskolonelkuracisto d-ro Dietl akceptas, parolas pri la celo de la kongresoj kaj finas per la vortoj: Laŭ nia devizo „Kuraĝe antaŭen!" ni komencu nian laboron. Poste li proponas la tagordon. Sekvas salutvortoj:

Landa reg. kons. Gass en germ. lingvo: Landestro d-ro Rintelen, malhelpita veni, komisiis min, vin saluti en la nomo de la lando Stirio kaj en lia propra. Ĉar la fremdulfrekvento estas mia speciala fako, mi salutas vin kore. Ankaŭ vi ja estas fervoregaj favorantoj de mia fako pro tio, ke vi per via internacia helplingvo plifaciligas la vojaĝadon, ja en multaj okazoj nur ebligas ĝin. Sed ankaŭ pro alia, pli alta senco via kongreso estas salutinda. Vi estas donintaj al la homoj de ĉiuj nacioj per via Esperanto ilon, ne nur por reciproka interkompreniĝo sed ankaŭ interkonsentado. Tiu e-tas la unua paŝo al interrepaciĝo de la nacioj. Kaj neniam estas pli necese ol nun, ke la popoloj interkompreniĝu, senkulpigu unu la alian kaj lernu interpaciĝi. Tiun vojon milionoj da homoj deziregas, ĉu germanoj, francoj, angloj aŭ aliaj. En ĉi tiu senco bonvolu akcepti miajn salutvortojn.

La urbestro de Graz (soc.), germane: Mi salutas vin elkore en la muroj de nia urbo. Volonte mi alparolus vin en Esperanto, sed ne scipovante ĝin mi devas paroli en mia gepatra lingvo Vi kunvenis por kompletigi vian organizon kaj interkonsiliĝi pri pluaj paŝoj alproksimigontaj vin al via celo. Kion vi. tre est. s-inoj kaj s-roj. planis kiel celon, estas eksterordinare salutinda faro. El la ĉi tie antaŭmetita himno de l'esp.-istoj mi legis strofon, kiu laŭ mia opinio plej komprenige kaj ĝojige esprimas la tendencon de via movado: „Sur neŭtrala lingva fundamento . . ."

Se via agado, tre est. ges-oj, celas, interfratigi la popolojn de l'terglobo, se ĝi servu al forigo de la kontraŭecoj ekzistantaj ankoraŭ inter la popoloj, jen ĝi servas ankaŭ laŭ pli alta senco al la pacigo de l'mondo.

Kaj subteni tiajn klopodojn kaj akceli ilin, laŭ mia opinio estas devo de ĉiuj homoj, kiuj deziras, ke la diversaj nacioj sin fine vere komprenu reciproke, ne almilitu unu la alian, kio bedaŭrinde depost jarmiloj okazas plej malbonŝance por la homaro kaj ĝia kulturo.

Pro tio mi opinias, ke via movado ankoraŭ freŝdata ja sed tamen ampleksanta jam la tutan mondon kaj ĉiujn klasojn sociajn kaj homojn diversaspecajn, havas antaŭ si gloran estontecon kaj ke fakte prosperos al ĝi, alproksimigi la popolojn. Tiel, tre est. ges-oj, sentegale al via himno, al viaj klopodoj mi salutas vian kunvenon kaj deziras ne nur al via kongreso sed al via movado entute, kiu ampleksas aŭ almenaŭ plenampleksu la tutan teron, pro la intereso de la popolinterfratiĝo la plej bonan sukceson!

Ĉefinsp. Bargetzi, reprez. la ĝen.-direkcion de la Aŭstriaj Fervojoj (germ.): Estimata festkunvenintaro! La ĝen.-direkcio de Aŭstr. F. kore dankas pro la invito al via kongreso kaj deziras al viaj laboroj plej bonan sukceson. (Daŭrigante en Esperanto.) Kiel vi scias, la ĝen.-dir. ĉiam klopodas, plej eble akceli viajn klopodojn kaj faros tion ankaŭ estonte...

Ĝen. sekr. Josef Rückl, reprez. Landligon por fremdulfrekvento en Stirio (germ.):... Mi povas certigi vin, ke ni montras plej grandan atenton al via movado. Antaŭ la milito ni estis eldonintaj gvidlibron tra Stirio kaj Graz. Nuntempe malagrablaj financaj kaŭzoj malebligas al ni subtenon de via movado, sed kiam iel estos eble, ni certe uzos E., kies grandan valoron por la fremdulfrekvento ni konas.

Sekvas salutvortoj de l' prez. de AED ĉefinspektoro Steiner, por la landestraroj Steiermark-kolonelo Hackl, Wien-Smital, Niederösterreich - f-ino Zöchling, Oberösterreich-Bürger, Salzburg-Pohlhammer, Tirol- juĝisto d-ro Blaas. Parolas poste la delegitoj de la III. Jugoslava E.-kongreso, samtempe okazanta en Maribor (Marburg), d-ro Milan Vlad. Crlenjak kaj instruisto Zvonko Rehoric.

Direktoro de UEA, s-ro Hans Jakob-Genève: ICK delegis min, partopreni vian kongreson kaj mi uzas la okazon, rakonti al vi pri ŝanĝoj. Antaŭ milito UEA suferis konkurencon de la fakaj kaj landaj societoj. Nun post la milito nia movado staras sur pli firma bazo. Estas unuflanke la naciaj societoj, kiuj propagandas kaj kulturas E. kaj aliflanke UEA, internacia organizo. Ni volas servi al la esp-istoj konkrete, praktikigi la lingvon, por ke ĝi donu profiton. Ĉiu povas havi, se ne materian, almenaŭ spiritan profiton el ĝi. La interna ideo ekzistas tamen. Al ĝi venis nova: La „Spirito de Locarno." Nia celo estas, ke oni en la landoj atentu nin kaj ni donas realan servaron al ĉiuj samideanoj. Mi salutas viajn laborojn, deziras...

D-ro Halbedl - Graz salutas en la nomo de la intern. societoj scienca, jurista, de la Tutmonda Ligo de Ordo kaj int. ligo katolika; polica insp. Hirz-Wien por la Tutmonda Polica Ligo, la polica unuiĝo-Wien kaj la Graz-aj policistoj-samideanoj.

La esperantlingvajn paroladojn Smital-Wien tradukis germanen. Alvenintaj estis telegramoj kaj salutskribaĵoj de Int. C. K. Genève, Paneŭropa Unio-Wien, de la Ligo de Germ. Esp.-istoj en Ĉeĥoslovakio, de la germana E.-Ligo-Berlin, de la laborista E.-grupo-Innsbruck, de dir. Schamanek kaj R. M. Frey-Wien.

En germana lingvo AED-prez. parolas pri „La nuna stato de la E.-movado ĝenerale kaj en Aŭstrio speciale".

Post sciigo de la kongresaranĝoj per LKK-prez. Hackl la kongres-prez. d-ro Dietl dankas al la laborkomitatanoj kol. Hackl kaj al s-roj Rogler, Hallamayer kaj Mader (ĝen. sekr.) pro iliaj klopodoj, havigi al ni tiun belan feston.

Saluttelegramoj estas forsendataj al Bundespräsident Dr. Michael Hainisch, Bundeskanzler Dr. Rud. Ramek kaj al d-ro Edmond Privat-Genève.

LKK-ano Hallamayer atentigas, ke E.-ekspozicio estas dum la kongreso senkoste vizitebla.

Post kantado de la himno d-ro Dietl fermas la kunsidon tagmeze.

Pentekostan dimanĉon, 14·30 h, komencas la laborkunsidoj.

La dua kongres-prez. Steiner malfermas la kunsidon sciigante, ke unue estos Kongres-laborkunsido kaj poste AED.-laborkunsido, kiun tamen ankaŭ ĉiu kongresano povas ĉeesti ne havante la rajton, proponi aŭ voĉdoni.

A. Komuna kongresa kunsido.

Tagordo: 1. Komuna propagando, 2. eventualaĵoj.

1. Parolas Hallamayer kaj d-ro Halbedl-Graz kaj Smital-Wien. La lasta diris: Nia devizo devas esti: „Ni esp-istoj celas la kunigon spiritan kaj koran de diversklasaj homoj. Ni ne opiniu, ke ni per E. povos ŝanĝi la diversajn tendencojn en la socio. E. estas nur ilo. En la unua propaganda stato ni ĉiuloke iru komunan vojon. Ni povas „dise marŝi kaj komune venki". Tiel ni certe atingos nian celon

baldaŭ. La esenco de nia neŭtraleco estas, ke ĝi estu **aktiva** neŭtraleco. Ni laboras kaj poste lasas al ĉiu la rajton, uzi E.-on laŭ sia bontrovo. Antaŭ priparolo de direktivoj mi atentigas pri grava eraro, nome la opinio, ke E. jam per si mem konvinkas pri la neceseco kaj entuziasmigas. Oni devas ĉiun unuopan kapti je personaj malfortecoj. Neniam propagandu alipartiano ĉe eminentulo, tion faru ĉiam nur sampartianoj . . .“ Mader proponas por grupo Graz: „La VIa Aŭstria E.-kongreso deziresprimas, ke en okazo de necesa komuna propagando inter diverstendencaj E.-organizaĵoj la lokaj societoj ĉiam interkonsentu pri la vojo irota. La maniero de la efektivigo restu rezervata al la lokaj societoj“. (Akceptita.)

2. Eventualaĵoj. Laŭ propono de la konferenco en Locarno jenaj decidoj estas konfirmotaj de la kongreso nacia: 1. Modifoj kaj aldonoj al la regularo de K. R. 2. Elekto de s-roj Petiau kaj Schoofs (Belga Ligo) kiel prez. kaj sekr.-kas. de K. R. por tri jaroj post Edinburgo. 3. Elekto de d-ro Privat kaj d-ro Stromboli kiel anoj de C. K. por sama periodo. Unuanime oficiale akceptitaj. Fino 15·30 h.

B. Unua Laborkunsido de AED. Pro neĉeesto de la sekretario oni komisiis s-ron Werner-Wien anstataŭe esti protokolanto.

La prezidanto antaŭparole petas kunlaboron de ĉiuj, ĉar organizo ne povas efike labori sen kunhelpo de ĉiuj. Ĉiama kontakto inter la grupoj kaj izoluloj (kie ne estas grupoj) kaj la centro nepre necesa. Kasisto de AED Braun-Wien petas, ke la grupoj tuj pagu la kotizon por 1926, ĉar ankaŭ ni devas pagi al K. R. ĝis fino de junio. Raporto pri la gazetservo ne estas transdonita.

Al la tagordo:

1. Locarno. Raportis la gazetoj. Kelkaj aferoj ne ankoraŭ estas maturaj por publikigo.

2. U.E.A. Parolas dir. Jakob-Genève: La movado progresis al oficialeco. Ni nun jam komencas interrilati rekte kun la registaroj. Por speciala celo mi venis Aŭstrion, por instali ĉi tie laborefikan teritorion de U. E. A. Modele estas por tio Ĉehoslovakio. Tie en 328 lokoj estas delegitoj de U.E.A. Por tiu celo estas bezonata laboremulo en Wien.

3. Nia organizo. a) Labormaniero de AED. Por ke AED povu efike labori, necesas, ke ĉiuj grupoj kaj izoluloj (kie ne estas grupoj) aliĝu al nia landa organizo. Ili pagu la malgrandan jarkotizon, kiun ni bezonas por nia propagando. Multan monon ja elspezas la estraranoj el propra poŝo. b) Raportoj ktp. Ĉiama kontakto inter grupoj, izoluloj, landestroj, kaj AED-centro estu la unua devo de ĉiu. Ĉiu sendu ĝis la 5a de ĉiu monato raporton (aŭ minimume vivsignon, ĉar ĉio interesas nin) al AED-prez. kaj kopion al la landestro koncerna. Ni bezonas tiujn raportojn por nia raporto al C. K. kaj U.E.A. en Genève, kiun ni promesis sendi ĉiun monaton ĝis la 15a. Ni ankaŭ sendos raporton al „Esperanto“-Genève kaj „Heroldo“-Horrem por publikigo. Per tio la grupoj ŝparos monon kaj la raporto en tiuj ĵurnaloj estos pli efika ol se nur unu aŭ alia raportus. Kompreneble ĉio interesa estas publikigata en nia oficiala „Aŭstria Esperantisto“. Ankaŭ kiam grupo aŭ izolulo volas entrepreni iun aferon gravan, interrilatigu vin kun ni. Ni helpos vin aŭ per intervenoj ĉe kompetentaj personoj aŭ per konsiloj. Per tia malkaŝa agadmaniero ni povas eviti, ke ne du personoj komencu samtempe la saman aferon kaj senvole malhelpu unu la alian. c) Labormetodoj de la grupoj. — Steiner: Unua devo de la grupoj estu, fari esp-istojn. Oni malpli amuziĝu kaj pli serioze laboru! Seriozaj homaj laboros. Mader opinias laŭ agado de grupo Graz: Oni allogu per amuzoj, instruu per ludoj! Per kelkafojaj amuzvesperoj oni havigas monon. Steiner: La maniero de la laboro restu zorgo de la grupoj, sed oni entute laboru konscie. — Smital-Wien: Aŭ—aŭ! Aŭ multaj netaŭgaj aŭ malmultaj veraj esp-istoj. Nur faktoj (t. e. finlernintaj esp-istoj) konvinkas. Do li avertas kontraŭ la longaj „nurmembro“-listoj. — Jakob-Genève: Ni laboras kun homoj de tre varia percepto. Ni sekvu la principon de la jezuitoj: „Allen alles zu sein, um alles zu gewinnen.“ Ni ekspluatu la amuziĝemon. Doni monon kaj resti neesperantisto ankaŭ servas nin. Rogler-Graz: La granda nombro de organizaĵoj malhelpas. Oni ĉie agu kiel ni — — — instigu la finkursintojn estiĝi membroj de la grupoj. Ĉe ni ili per sia membreco ricevas senpage nian oficialan organon. — Fino je la 17a.

Poste komuna promenado tra la urbo kaj je la 18a fotografado antaŭ la operejo.

Je la 20a: Festvespero de E.-grupo Graz okaze de ĝia 20 jara jubileo en „Gagistensaal“.

Majstran festparoladon prezentis prof. Hainschegg-Graz. (El ĝi ni en venontaj numeroj publikigos partojn.)

Poste la Radio-kursgvidanto Smital ĝojigis la ĉeestantojn per elokvente prezentita humoraĵo. Precipe ĝojegis multaj ĉeestantaj R.-aŭskultantoj, kiuj sian instruinton bone komprenis.

Wallner-Graz per siaj spritaj deklamoj kaŭzis larmojn pro ridado. Tri paroj — ĉarmaj gejunuloj de grupo „Südmark“ — en naciaj kostumoj bonege prezentadis naciajn dancojn. Ege kontentigis ankaŭ la salona muzikorkestro ludinta en la paŭzoj. Post noktmezo la partoprenantoj disiris kun danko al la Graz-aj samideanoj, kiuj ankaŭ per sia fest-

vespero montris, ke ili estis kapablaj aranĝi kongreson.

London. 8·30 h. Dua laborkunsido de AED d) Preparoj por aŭtuno. Steiner: Ĉie en Aŭstrio la kursoj komencu en la unuaj tagoj de l' oktobro. Pro tio jam nun ekvarbu, prizorgu instruejon kaj publikigu en septembro en viaj lokoj, ke la kurso komencos (ejo, dato, horo). Sciigu pri tio ankaŭ AED. — Smital: Izolaj propagandistoj kolektu sialokajn Radioaŭskultantojn. (Sciigon al AED) e) Propagandvojaĝo en aŭtuno. — Steiner intencas laŭ priparolo kun d-ro Privat fari — komenconte meze de l' septembro — propagandvojaĝon tra Aŭstrio se eble akompanata de orientlanda esp-isto. La intencata vojo estos Bregenz—Innsbruck — Salzburg — Saalfelden — Villach—Klagenfurt — Leoben — Graz — Wr.-Neustadt—Wien—Korneuburg — Klosterneuburg — Krems —St. Pölten — Steyr — Linz. Propaganda celo estu atingata per migranta ekspozicio kun paroladoj ktp. Kostoj malgrandaj. Programo aparte aldonata. Personoj, kiuj ne ricevis la programon kaj havas intereson, ke ankaŭ en ilia loko okazu tia propagando, skribu al AE. Lidl-Lankowitz rekomendas uzi propagandfilmon. f) Instruado. — Instruontoj anoncu kursojn en lernejoj al AED. — E. estos enkondukata aŭtune en la XIIIa distrikto de Wien (liglanda edukejo-prof. d-ro Casari) kaj en Graz en la 7a kaj 8a klasoj de la 3 gimnazioj (prof. Hainschegg). Smital preferas la „parolan“ metodon al la „gramatika“. Ĉefkondiĉo, ke la instruanto mem scipovas paroli. Instruisto Rehoric-Zagreb samsperta pravigas lin. Lidl: Oni instigu la ministerion je enkonduko en la lernejon. Steiner raportas pri sia vizito en la instruministerio pro tiu afero. Paŝo post paŝo... Dir. Jakob-Genève en longa parolado esprimas sian ĝojon pri la kongreso mem, la celkonscia laboro en Aŭstrio entute kaj la nunaj laborkunsidoj kaj finas per la vortoj: Mi gratulas al vi, ke vi nun havas kiel generalon s-anon Steiner kaj ties stabĉefon Smital. g) Statutoj. Fondontoj de grupoj bonvolu sin turni pro statutoj kaj koncerna petskriko al publika estraro al AED, kiu por la memkostoj (eble Ŝ 1.—) sendos al ili ambaŭ. La fondonto nur bezonos subskribi kaj sendi la aktojn al la publ. estraro. h) Parolanto vojaĝanta. Steiner: Pripensu la aferon de vojaĝanta parolanto por lokoj, kie oni volas enkonduki aŭ subteni la E.-movadon. Devas esti malmultekosta. i) Statistiko. Steiner: Ĉiu skribu la nomojn de konataj al li esperantistoj al AED, precipe de izululoj, ĉar tiuj gravas kiel pioniroj. Per tio oni povos kompletigi nian E.-karton de Aŭstrio, kiu tiel plaĉis en Locarno kaj estis rekomendita per C. K.-statistikestro d-ro Dietterle al la aliaj K. R.-anoj. Lidl opinias, ke stat. ne gravas. Smital kontraŭe montras, ke nur faktoj konvinkas. Rogler proponas oficialan demandaron; Smital rilatigas sin je malbonaj tiaj spertoj ĉe la lasta AED.-konferenco. j) „Aŭstria Esperantisto“. Rogler proponas la agadmanieron de la grupo Graz: Membroj pagas pojare Ŝ 6.— kaj ricevas senpage AE. Klein-Wien kontraŭas, opinias devigan abonon ne ebla. AE.-redakt. Steiner raportas: La bilanco por aŭg. 1924—fino 1925 finis bonŝance sen deficito, sed nur pro tio, ĉar li faris mem ĉiujn laborojn (60—80 h pomonate) senpage. Se la esp.-istoj aŭstriaj ne havas intereson, AE. malaperos. Abonon oni povas komenci ĉiun monaton. Helpu per varbado de anoncoj (Vidu art. en n-ro 4 „Ĉu vi lernis kalkuli?“) Smital: AE. estas nia plej necesa, pruvita propagandilo. — Oni konsentas, aĝi laŭ ekzemplo de nova grupo en Linz, kiu postulas, ke la grupanoj honordeve abonu AE, kaj samtempe sendis al AE. sian membro-liston pro alsendo de l' gazeto.

4. Fervojistaro. Steiner: Ekzistas Internacia Asocio Esperantista Fervojista. Siatempe la 2. gvidanto de tiu asocio atakis min en sia gazeto, ĉar mi dum la Wien-a kongreso fondis TELF. Mi faris tion je iniciato de la germanaj samideanoj opiniante, ke la kampo por faka mond movado jam estas matura. Sed mi tiam eraris kaj baldaŭ likvidis la komencitan laboron. La siatempaj atakoj protokole estis malpravigitaj de la aŭstriaj atestantoj. Ĉiu el miaj samfakuloj aŭstriaj certe konsentos mian vidpunkton, ke mi nur tiam povus ekpensi pri kunlaboro al IAEF, kiam la siatempa afero korekte estos elmondigita. Ni aŭstrianoj perdis per la mondmilito multegon, sed korektecon ni konservis al ni. Krom tio mi opinias, ke unue devas esti en ĉiuj landoj fortaj landorganizoj kaj poste oni povos ekpensi pri intern. organizoj fakaj. Jam nun povas, ja devas esti kontakto skriba inter la diversaj landorganizoj, por ke unu profitu de la sukcesoj de la alia. Ni havis grandegan sukceson, nome la permeson, porti la stelon dum la deĵoro. Kial IAEF ne profitis el tio, kial la landorganizoj en aliaj landoj, ekz. en Germanlando, Italio ktp. ne ankaŭ atingis la samon? Malfacile estas, fari aferon estante la unua, sed imiti jam faritajn de aliaj sukcesojn ne povas esti malfacila afero. Ni en Aŭstrio jam fondis nian landorganizon. Ni per tiu nova organizo ne intencas malutili la grupojn, ĉar ni postulas, ke ĉiu esperantista fervojisto restu membro de sia loka grupo (nur en Wien ili fondos apartajn grupojn) kaj krom tio anoncu sin al Landunuiĝo de Aŭstriaj Esp. Fervojistoj, sendante samtempe por 1926 almenaŭ 20 gr kiel kotizon. Per tio ni ricevas statistikon pri la fervojistaro esp. en Aŭstrio. Ni petas, ke la grupoj kaj izoluloj ankaŭ sciigu la nomojn de al ili konataj fervojistoj esp. al ĉefinspektoro Steiner, Bisamberg bei Wien. La fervojistoj, loĝantaj en multegaj disaj lokoj kaj deĵore multe vojaĝantaj estos pioniroj por nia movado en multaj okazoj. Ili eluzu tiun ĉi bonŝancon, estiĝi pioniroj por nia movado je la bona famo de nia fako. Nia ĝen.-dir. d-ro Maschat kiel ĝis nun subtenos nin. Pro tio koran dankon al li.

5. Radio. La gvidanto de Radio-kurso ĉe Ravag, Smital: La E.-kurso per Radio, la plej vasten iranta propagandilo nuntempa, alportis rezultojn ĝoje surprizajn. Korespondado kun ĉiuj kursanoj pro troa multeco ne estis ebla. La plej multaj el la aŭskultantoj estas kontentaj pri la kurso; la opinio de kelkaj esperantistoj-kritikuloj ne tuŝas min. (Aplaŭdo.) — Steiner: Ni proponis al Ravag antaŭ pli ol 7 monatoj aranĝon de mallongaj disaŭdigoj pri Aŭstrio por eksterlando kaj denove po unu kurso por komencantoj kaj progresintoj en aŭtuno. Ŝajne ne regas ĉe Ravag la necesa intereso por nia movado, kvankam ili ĉiam pretendas, subteni ĝin. Do mi rekomendas, ke ĉiu unuopa esp.-isto skribu leteron en germana lingvo, kies enhavo tekstu proksimume jene: „Al Aŭstria Esperantisto, Korneuburg. Laŭdire en aŭtuno ne okazu denove E.-kurso per Radio-Wien. Pli ol 80 sendstacioj en la mondo disaŭdigas sinsekve E.-kursojn. Tuŝus strange, se Ravag ne estus inter ili. Ni do postulas en aŭtuno unu kurson por komencantoj, duan por progresintoj. Kun miro ni eksciis, ke la propono de la aŭstria esperantistaro koncerne mallongajn paroladojn pri la artaĵtrezoroj kaj naturbelecoj de Aŭstrio en E. por interesigi la eksterlandon, ne ankoraŭ estas fintraktita de Ravag. Tiaj paroladoj ne nur multege helpos al fremdulfrekvento sed ankaŭ al la Radio-abonantoj pro ekzercado.“ Nun sekvu la subskriboj de ĉiuj al vi konataj radioabonantoj (ĉu ili havas intereson por E. aŭ ne) kun aldono de la numero de iliaj „Berechtigungsscheine“. Bonvolu alsendi certe multnombre ĝis 5. julio, ĉar nur amaso da leteroj efikos ĉe Ravag.

6. Metodo Mertner. D-ro Blaas-Innsbruck proponas: „Al Mertner-Verlag München. Esperanto-kongreso kunveninta pentekoste en Graz deziresprimas, ke la eldonejo Mertner plej urĝe eldonu la jam pretan lernolibron pri E. laŭ metodo Mertner verkitan de d-ro Blaas.“ Unuanime akceptita.

7. Paneŭropa Unio. Steiner: Tiu grandstila movado, pri kiu vi jam kelkfoje legis en A. E. (d-ro Sós esp.-igis „Paneŭropan Manifeston“) parte jam uzas krom aliaj lingvoj E. kaj havas la intencon iom post iom enkonduki ĝin. Ni volonte uzas la okazon por E. Mi priparolis tiun laborkampon dum la konferenco en Locarno kaj ankaŭ oficiale kun nia d-ro Privat kaj ni decidis, helpi la Paneŭropo-movadon ne identigante nin kun ĝi. Sekve mi ĉi tie, ne kiel prezidanto de AED, sed kiel raportanto, invitas vin ĉiujn, kiuj havas intereson por Paneŭropa Movado, aliĝu al ĝi. Informojn vi ĉiam ricevos de la Centra-oficejo, Wien, I., Hofburg, kie jam ekzistas E.-fako. Ankaŭ al la jam fonditaj kaj fondotaj sekretariejoj en la diversaj landoj E.-helpantoj estos delegataj. Sur aliĝanoncoj bonvolu ĉiam mencii „Esperantisto“. En oktobro estos en Wien la unua Paneŭropa Kongreso, al kiu certe venos kelkcent kleruloj el diversaj landoj. Ni havos la okazon ilin interesigi por E.-Do ni zorgu, ke multaj esp.-istoj ĉeestu la kongreson, ĉu ili estas por aŭ kontraŭ la movado Cefafero, ke E. estos multe uzata dum la kongreso, kie prof. d-ro Jokl-Wien jam estas anoncita por E.-parolado. Pri la kongreso vi ankoraŭ aŭdos. Klein en la nomo de „Danubio“-Wien proponas: „La AED kunveninta dum la VI-a Aŭstria E.-kongreso rekomendu al la esp. societoj aŭ unuopuloj, kiuj trovas la paneŭropan ideon taŭga por certigo de la eŭropa paco kaj por plej baldaŭa oficialigo de nia lingvo, ke ili kolektive, kiel E.-sekcio de la Paneŭropa Unio aliĝu kaj propagandu por ĝi.“ Smital: Paneŭropo estas defendligo tute ne simila al la interna ideo de E. Cetere ĝi estas politika afero, je kiu la nuna kunsido pro sia nepolitikeco ne rajtas voĉdoni. Steiner: Persone mi varbis dum mia kongresparolado kaj nun por Paneŭropo, sed mi pro la jam de s-ano Smital skizitaj kaj la de mi cititaj kaŭzoj ne povas voĉdonigi vian proponon, ĉar ĝi estas kontraŭ niaj statutoj. Krome E.-sekcio ĉe la centro jam ekzistas. Poste la prez. pro informo petas la ĉeestantojn, ke ili montru per levo de la mano, ĉu ili konsentas tiun agadmanieron de la prez. Ĉiuj escepte Klein konsentas. Steiner: Mi dankas al vi, ĉar vi montris per tio, ke vi fidas nian gvidadon.

8. Aŭstria Esp. Instituto. Smital: La instituto, kies projektitan fondon jam ĝoje salutis nia Va kongreso en Salzburg, estos komunutila, scienca, nepolitika. Laŭ sia esenco ĝi ne konkuros kun iu jam ekzistanta instituco por E., sed male laboros en kontakto kun la koncernaj reprezentantoj, laŭnecese ankaŭ kun unuopaj unuiĝoj aŭ personoj. Same ĝi interrilatigos sin bezonokaze kun oficialuloj, mondorganizaĵoj, societoj, personoj alilandaj kaj akceptos instigojn laŭeble. Ĝiaj taskoj estos A) koncerne E.-on: laŭplana propagando, instruo, literaturo; B) konc. Aŭstrion: Varblaboro en fakistaj rondoj alilandaj, eluzo de interrilatoj peresperantaj; C) konc. aŭstr. loĝantaron: informoj pri kaj per E., tradukoj. La unuopajn fakojn gvidos fakistoj.

9. Deficito de XVI-a. Steiner: Kiel vi legis en AE, UEA kolektas el eksterlando donacojn por forigo de l'deficito. Ankaŭ vi ĉiuj helpu! Sendu monon al d-ro Sós-Wien, I., Tuchlauben 18.

10. Komerco. Kolektu en viaj lokoj la adresojn de la komercistoj, kiuj uzas aŭ volas uzi E. kaj sendu ilin al AED.

11. Nia VII-a. D-ro Blaas invitas en la nomo de Tirolio por 1928 al Innsbruck. Ĉar por 1927 neniu loko invitis, la prez. proponas kiel kongresurbon Wien. (Ĝoje aplaŭdita.)

12. XVIII-a. Ĉar prof. d-ro Christanell-Salzburg veturos al Edinburgo, la prez. proponas: La kongreso deziresprimas, ke prof. Christanell reprezentu Aŭstrion en Edinburgo. Akceptita.

13. Stenografio. Steiner atentigis pri la alvoko en AE. Stenografio esp. laŭ germana

unuecsistemo kompilita de dir. Schamanek estas prilaborota en la rondo de fakuloj. Ili anoncu sin.

14. Instruado en popolaltlernejoj ktp. Steiner: Imitu la ekzemplon de nia landestro Goldmann, kiu enkondukis en St. Pölten E. ĉe popolaltlernejo kaj instigis la enkondukon en la burĝlernejo. F.-ino Prokopp faris la saman ĉe la burĝlernejo en Krems. En Urania, kiu havas filiojn en la provinco, antaŭe estis ankaŭ E. kurso en Wien. En la lasta tempo E. malaperis el la programo. Ni devas reaperigi E. ĉe Urania-Wien kaj vi certe konsentas, ke nia konata Smital estiĝu tie instruanto. Ĉiuj konsentas, nur Smital kontraŭas.

Eventualaĵoj ne estas. Prez. Steiner fermas la kunsidon kun danko al ĉiuj per la vortoj: „Sed subtenu nin!"

Kolonelo Hackl en la nomo de LKK kaj de la kunsidintoj dankas al la prez. korege. Fino je la 13a.

14·30: ekskurso al Maria Trost. Parto de la kongresanoj forveturis je la 18a kaj la samideanoj el S. H. S. antaŭtagmeze venintaj de la Jugoslava Kongreso (pli ol 20) je la 20a.

La prez. de A. E. D. ricevis jenan sciigon:

Tre estimataj samideanoj

nia prezidanto d-ro Privat petis min, plej kore danki pro via afable sendita simpatitelegramo el Graz, pruvante, ke nia internacia kunlaboro estas vere kora kaj esperigas bonan sukceson ankaŭ por la estonto. Kun plej samideanaj salutoj.

Genève, 5. VI. 1926.

Int. Centra Komitato
ĝen. sekr. Rob. Kreuz.

Mondjunularo katolika (Moka).

„Mondjunularo katolika" aŭ „Moka", estas internacia unuiĝo de la katolika gejunularo tutmonda. Ĝi ĉefe celas interfratiĝon de nia junularo katolika en vere kristana senco kaj volas kunhelpi krei internacian kaj socian ordon bazitan ne sur perforto, sed sur justeco kaj amo. Ni laboras kiel junula grupo de Internacio katolika (Ika), sed estas sendependaj en organizaj aferoj. Nia oficiala lingvo estas Esperanto kaj nia oficiala organo „Katolika mondo" kun speciala aldono „La juna batalanto". En ĉiuj lokoj, kie ni havas aktivajn membrojn, laboras delegito. Krome ni havas subtenantajn membrojn, kiuj nur pagas kotizon. Organizaĵoj kaj grupoj povas aliĝi korporative. En ĉiu lando estas elektata nacia sekretario kaj nacia komitato. Nia protektoro estas L. E. M. Karl Gustav grafo Maylath, episkopo de Transilvanio (Rumanujo). Vi iĝas Moka-ano, se vi pagas la membrokotizon (por Aŭstrio jare 3 ŝil.). Internacia korespondado estas peruta de la internacia oficejo. Oni skribu nomon kaj adreson, aĝon kaj profesion kaj specialajn dezirojn aldonante laŭvolan monsumon. (Adr.: Wilh. Solzbacher, Honnef a. Rhein, Spiesgasse 1, Germanio.) Neniu katolika junulo aŭ junulino, kiu sentas en si la spiriton de la venkoĝoja junulmovado forrestu el nia ligo! Aliĝojn al Moka, monsendojn, abonkotizojn akceptas por Aŭstrio la estro de tiea nacia komitato: Macheiner Eduard, Borromaeum en Parsch, apud Salzburg, Aŭstrio.

Aŭstria Esperanto-Delegitaro

Bisamberg bei Wien, Nr. 248.

Reprezentis Aŭstrion ĉe la kongresoj en Maribor s-ro Schwarz-Graz (ankaŭ nian VI-an kaj Esp.-Soc. por Stirio) kaj en München s-ro Bederlunger-Innsbruck.

Prezidantarkunsidoj de A. E. D. okazis la 16-an majo kaj 5-an kaj 11-an junio.

Landestrara kunsido por Tirol:

Innsbruck 30. majo 1926. Nova estraro: D-ro Leo Blaas — prez., Rol. Kühbacher — sekr. Krome Joh. Jester kaj Ed. Seekirchner (ambaŭ kiel delegitoj de la laborista grupo — Innsbruck).

Al la landestroj, grupoj kaj izoluloj de A. E. D.!

Bonvolu studi la protokolon de l' VI a kaj agi laŭ ĝi.

Gazetarservo: En ĉiu aŭstria gazeto aperu ĉiusemajne almenaŭ noteto pri E. — Uzu kiel fonton A. E.! Pli grandajn artikolojn, bezonatajn eventuale de redakcioj, postulu de A. E. D.! Ne forgesu, regule sendi la eltrancaĵojn ĉiam ĝis la 5 a de l' monato.

Nova grupo:

Hainfeld, fond. 1. junio. Estraro estas publikigota. (Dankon al landestro Goldmann kaj instr. Wandl-Hainfeld.)

Kursoj komencitaj:

Innsbruck: Por progresintoj de la laborista grupo d-ro Blaas.
Mautern: 1. junio (f-ino Lustig-Krems). Lernejdirektoro subtenas per disponigo de lernĉambro.

Kursoj finitaj:

Saalfelden: Por progres. (prez. Wallinger), por komenc. el „Katol. Junularo“ (pastro Hutegger), stenografia laŭ unuecsistemo (64 ptp., sekr. Neumair).
Hainfeld kaj Traisen.

Ilustranta noto. En la kunsido de „Esp.-Delegitaro de Wien“ la delegito de E.-Societo „Danubio“, s-ro Klein, komencis sian raporton pri Graz per la frazo: „La kongreso en Graz estis dudekminuta komedio, aranĝita de la du ĉefaktoroj s-ro Steiner kaj Smital.“ La red.

De Esp.-Delegitaro de Wien.

Wien, la 7. junio 1926.

La 5-an de junio okazis en la Nova Viena Komerca Akademio ĝenerala monatkunveno de la Viena Esperanto Delegitaro por priparoli la aŭstrian Esperantokongreson en Graz kaj ties konsekvencojn por la aŭstria Esperanto-movado. Oni fondis la Paneŭropan komitaton de Viena Esperanto-Delegitaro por intertrakto kun la Paneŭropa Unio kaj komuna laboro por preparo de unua Paneŭropa kongreso okazonta en Vieno de la 4-a ĝis 11-a de oktobro 1926. El la sekvinta debato evidentiĝis, ke la ĝisnuna prezidanto s-ro W. Smital ne povas plu plenumi tiun ĉi funkcion, kaj li rezignis.

La adreso por ĉiuj alskribaĵoj por la Viena Esp.-Delegitaro estas Rajmund Ĉech, IX/1, d'Orsayg. 7/23.

Por E. D. W.: Ĉech, sekr. kaj prov. gvid.

Dr. Emil Pfeffer, por la gazetara servo.

Deklaro.

Dum mi la lastan delegitaran kunvenon ne povis partopreni, estis mi elektita kiel membro de l' Paneŭropa Esperanta komitato. Ĉar dum tri monatoj la estim. gesinj. delegitoj ne kunvenos, mi ilin sciigas, ke mi la elekton, kiu sen mia scio kaj volo okazis, ne povas akcepti.

Dr. Hugo Jokl.

Al Esperanto-Deleg. de Wien al manoj de l' proviz. gvid. s-ro R. Ĉech, Wien, IX., d'Orsayg. 7/23.

Bisamberg, 11. junio 1926.

Bonvolu akcepti jenan deklaron, kiun vi eldevigis per via agadmaniero en la lasta kunsido okazinta la 5. junio.

Viaj du membroj d-ro Pfeffer kaj Ĉech, estante anoj de A. E. D.-direktantaro precize konis la tute klarajn direktivojn por la traktmaniero de la „P. U.“-afero. Ili estis deciditaj de A. E. D.-prezidantaro, priparolitaj kaj aprobitaj en K. R.-kunsido en Locarno. Konfirmis ilin la C. K.-prezidanto kaj poste ankaŭ la laborkunsido de A. E. D. en Graz (per ĉiuj voĉoj kontraŭ la sola de s-ro Klein-Wien).

Ke vi pretigis vin decide al akcepto de propono kontraŭ tiuj direktivoj, kaŭzis, ke via ĝistiama gvidanto W. Smital tuj rezignis sian funkcion deklarante, ke li ne povus respondi tian decidon.

Nia prezidanto, kiu ĉeestis, avertis vin ankoraŭ unufoje, detale klarigante la supre menciitajn motivojn.

Tamen (aŭ spite?) vi akceptis tiun proponon kontraŭ la demokratia principo kaj la plej simplaj reguloj de organiziteco.

Kompreneble la A. E. D.-direktantaro devas rifuzi vian decidon.

Bedaŭrinde la agadmaniero de la „Danubio“-delegitoj (ankaŭ ĉifoje parolis nur tiuj) eksplodigis la jam ekzistintan malkontentecon pri ili inter la esp.-istoj de Wien. Tio evidentiĝas per sineksigo de kelkaj societoj el E. D. W.

Via korporacio do ne nur agis kontraŭ la direktivoj de A. E. D. (detale motivigitaj al vi) sed evidente kontraŭ la interesoj de regula poresperanta laborado en Wien.

Tial A. E. D.-direktantaro ne nur havas la rajton, sed je sia bedaŭro ankaŭ la malagrablan devon, la torson de E. D. W. ne plu konsideri kiel landestraron de A. E. D. por Wien.

Tion ni komunikos al ĉiuj koncernaj adresoj.

Nia principo de ĉiama aktiva neŭtraleco, jam kelkfoje publike klarigita, kompreneble restas netuŝita.

Por A. E. D.: Steiner, prez. Müllner, sekr.

Eksigo. En la direktantarkunsido de A. E. D., 11. VI. 1926, la ĝen. sekr. s-ro Raimund J. Ĉech, kaj la gazetservestro s-ro d-ro Emil Pfeffer, ambaŭ membroj de „Danubio", estis eksigataj. Motivigo: Ambaŭ sinjoroj agis kontraŭ decidoj de A. E. D.-prezidantaro faritaj en ilia ĉeesto (!), konfirmitaj de A. E. D.-laborkunsido en Graz kaj K. R. en Locarno. Ili kunkaŭzis per tio malkonkordon en Esp.-Delegitaro de Wien, sineksigon de kelkaj grupoj neŭtralaj kaj fine eksigon de E. Del. W. el A. E. D. Krome ili ne estis plenumintaj la devojn konfiditajn al ili.

Por A. E. D.: Steiner, prez. Müllner, sekr.

„Paneŭropo"-reprezentanto de A. E. D. estas s-ro d-ro Edmund Sós, Wien, I., Tauchlauben 18, rekonita de P. U.

Kie oni renkontas E.-istojn kaj ricevas informojn?

So = d, Mo = l, Di = m, Mi = me, Do = ĵ, Fr = v, Sa = s.

Graz.

Esp.-Verein für Steiermark, Bürggasse 16, Gasthof (gastejo) „Altes Stadttheater", Di (m) 20—23 h.

Innsbruck.

Arbeiter-Esp.-Klub (Laborista klubo), Südtiroler Platz, Hotel Sonne, Do (ĵ) 20—22 h.

Esperanto-Klub. Gasthof „Goldener Greif", bei der Triumphpforte, Mi (me) 20—22 h.

Klosterneuburg.

Esp.-Servo, Martinstr. 59—61, gastejo Ebner (Leiter: Ebner u. Leidlmayr) täglich (ĉiutage).

Wien.

Aŭstria Katolika Ligo Esperantista, I., Freyung 6 (Pfarrkanzlei), Mi (me) 17—19 h.

I. Wiener Esp.-Verein, I., Weihburggasse 12, Kasino, Fr (v) 19·30 h.

Aŭstria Pacifista Esp.-Societo, III., Henslergasse 3, Hochparterre; Do (ĵ), 19—21 h.

Esp.-Verein der städt. Angestellten Wiens, IV., Schäffergasse 3.

„Konkordo", V., Margaretenplatz 4 (Terrassencafé), Do (ĵ) 19—22 h.

Esp.-societo „Danubio", VII., Neubaugasse 25, Café Elsahof, Mo (l) 19—23 h.

Akademischer Esperanto-Verein, I., Universität. Zusammenkunft wie (kunvenejo la sama kiel) „Danubio".

Esperanto Bücherstelle d. Freien Esp. Arbeitsgemeinschaft, VII., Lerchenfelderstr. 23; Auskünfte (informoj) Täglich 18—19·30 h.

Esp.-Bildungsverein „Supren". VII., Kaiserstraße 121, Café, Fr (v) 18—21 h.

Esp.-Unio Fervojista. XIV., Avedikstr. 2, Di (m) 19 h.

Bohema Klubo Esperantista, XV., Turnerg. 9, I. et., Narodni dum, Mi (me) 20 h.

Esp.-societo „Fideleco", Währinger Bürgercafe, XVIII., Staudg. 1, Di (m) 16—19 h.

Esp.-soc. „Kulturo", XVIII., Kreuzgasse 34, Café Hildebrand, Di (m) 19·30 h.

Rekomendindaj firmoj.

E. signifas, ke oni parolas E.-on.

Graz.

Café = kafejo:
„Post", I. Haring, Neutorgasse.

Korneuburg.

Bäckerei = bakejo:
Karl Luegmayer (E), Albrechtstraße 3.

Gemischtwaren = Diversaĵoj:
Alois Cisař, Bisambergerstr. 21.

Wien.

Elektrotechniker = elektroteknikisto:
Herm. Heutler, (E), VIII., Pfeilg. 53, tel. 22096.

Kleider, auch nach Maß = vestoj:
Alfred Mährischl, XII., Giersterg. 6.

Pension = pensiono:
„Esperanto" (E), IV., Argentinierstr. 53, Mezz., tel. 52740.

Speisehaus = manĝejo:
Stadttheaterkeller, VIII., Daungasse 1

Versicherung = asekuro:
F. Strubecker (E), III., Schützeng. 3, kunlab. ĉe asekurentrepr. „Janus", fond. 1824.

Zuckerwaren = sukeraĵisto:
Franz Prohaska, XII., Premlechnergasse 21.

Mi serĉas

por posttagmeza konversacio iun, kiu same kiel mi faros la ŝtatan ekzamenon por instrukapableco (Nov. termino) Rudolf Michael Frey, XVIII/2, Am Dreimarkstein 6.

Posedanto, administranto, eldonanto kaj respondeca redaktoro Hugo Steiner, Bisamberg 248.
Presejo: Gesellschafts-Buchdruckerei Brüder Hollinek, Wien III, Steingasse 25.